EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:10, februaro 29.** Pezo: Word 40, PDF 260 KB, sume 300 KB.

## AMO 108 eksponis amikecon

Tiu seminario, la unua en 2024, okazis en la 24-a de februaro, kun jena enhavo:

- Enkonduko: Stefan MacGill: *Amikeco kaj solidareco* (vidu sube).
- Renato Corsetti (Britio/Italio):
  'Semajno de internacia amikeco dum jarcento de internacia malamikeco'
- Xiao Huoli (Ĉinio): *Pri 40-jara korespondado kaj amikeco de ĉino Xiao Huoli kaj germano Dieter Laboga.*
- Vicente Manzano-Arrondo, Viko (Hispanio): *Ĉu vere ni parolas la saman lingvon?* Kaj *Kion mi lernis amikiĝante en Esperantujo*.
- Reza Kheirkhah (Tajvano): *Kiel Esperanto rolis en la disvastigo de mia amikaro tutmonde?*
- Spertoj/komentoj de la partoprenantoj; Fermo: Marija Belošević

Komputikaj puloj malebligis la eldiron de la enkonduko de SMG, sed la teksto estis anticipe sendita pri la temo. Jen ĝi:

"Amikeco devas esti pli ol nebula sento de boneco. Esenca elemento en profunda amikeco estas la solidareco. Ja tio portas koston, investon, same kiel la profunda amikeco. Solidareco implicas la biblian novtestamentan rakonton pri la bona samaritano kun la slogana frazo: 'iru la ekstran mejlon'. Nome, se iu devigas al vi la portadon de varoj unu mejlon, portu ilin eĉ du. Similaj instruoj troveblas en la skriboj de aliaj kredoj, la nobla korano enhavas similan mesaĝon, Same, la originan budhismon, kiam ĝi estis pli viv-filozofio ol ritoplena religio. La mesaĝo kernas en la principo de 'karma'. Nome: 'Kion vi rikoltas, tion vi semas'. Biblia vero!

Solidareco troviĝas ne nur en religiaj tekstoj. Ĝi troviĝas en la agoj kaj principoj de multaj bonfaraj organizoj, inkluzive de la Esperanto-movado. Rigardu nur la agadon de Fondaĵo Canuto en UEA, kiu membrigas ĉiujare pli ol 500 homojn el landoj kun limigita pagipovo aŭ transpagipovo. Rigardu la similan subtenadon en ILEI pere de sia koleghelpa kaso. Rigardu la helpo-projektojn, mi pensas pri la nederlanda iniciato E3, por financi komence katarakt-operaciojn en afrikaj landoj. Tio ja okazis antaŭ kvardek jaroj! Rigardu la kotizan sistemon en UEA, kun kvin kategorioj por la membreco. Absurde estus, se esperantisto en Usono aŭ Japanio aŭ Aŭstralio pagus la saman kotizon, kiel membro en Bolivio, Benino aŭ Barato.

Resume, solidareco estas esenca parto de amikeco, kaj la Esperanto-movado bone komprenas tion kaj vere praktikas ĝin.

SMG

## Esperanto-grupo estas fondita en Aruŝa

Jen plia pruvo de mia aserto, ke la kongreso en Aruŝa **jam** sukcesis! Lokaj grupoj formas la spinon de nia Esperanto-agado kaj kontribuas aktive al la elformiĝo de forta landa agado.



## Aliĝoj al Aruŝa bone progresas

En la 29-a de februaro aliĝoj por Aruŝa kreskis ĝis 368 personoj el 49 landoj: Germanio 45, Francio 36, Ĉinio 23, Italio 22, Koreio 21, Belgio 17, Japanio 17, Tanzanio 15, Pollando 15, Usono 16, Brazilo 14.

## Kontribuu al la Kongresa Temo!

La kongresa temo estas: Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo.
Ĉie en la mondo la medio, en kiu vivas la homoj, estas minacata de la agadoj de la homo. Tiu problemo ne estas hodiaŭa; ĝi jam ekzistas de multaj jaroj. La homoj devas trovi solvon por plibonigi la medion kaj la mondon. Por pace solvi tion, necesas, ke homoj parolu komunan lingvon en kulturo celanta interkompreniĝon. La lingvo estas la bazo de komunikado inter la homoj kaj unu el la esprimoj de la homaj kulturoj. Samtempe fortiganta la lokajn lingvojn, diversloke malfavorataj kaj minacataj, necesas antaŭenigi la uzadon de komuna neŭtrala lingvo por justa kaj demokratia interkomunikado. La lokaj lingvoj gardas trezorojn de la loka medio kaj de la loka homa kulturo, dum neŭtrala internacia lingvo, nome Esperanto, rolas kiel alirebla ponto inter la popoloj, metitaj en egaleco unu kun la aliaj.

Por plibonigi la medion, homaj grupoj klopodas organiziĝi pere de asocioj. Multaj el tiuj jam uzas Esperanton kiel laborlingvon. Agadante en aŭ trans la limoj de landoj kaj ŝtatoj, tiuj asocioj flegas pri siaj fakoj kaj komunumoj – kaj multaj komuniĝas sub

tegmenta monda organizo kiel Universala Esperanto-Asocio – plenumante la diversajn *Celojn por Daŭripova Evoluigo* de Unuiĝintaj Nacioj.

Dum la UK, la kongresanoj diskutos pri tio surbaze de la tri agadkolonoj de UN, nome paco, homaj rajtoj kaj evoluigo; pri la 17 celoj al daŭripovo pri la situacio de indiĝenaj kaj minoritatigitaj lingvoj samkiel pri la uzo de majoritatigitaj lingvoj, pri ponto-lingvoj kaj pri la monda lingva problemo; pri la situacio de virinoj, junuloj kaj aliaj minoritatigitaj grupoj en la mondo; kaj pri necesaj paŝoj kaj solvoj por daŭripova evoluigo de niaj socioj kaj la flegado kaj plibonigo de niaj medioj kaj de nia mondo, komuna hejmo de la homaro.

La reĝisoro de la kongresa temo en 2024 estas François Hounsounou, veterana esperantisto kaj instruisto el Benino. Li estis estrarano de TEJO pri Landa kaj Afrika Agado, plurfoje estis membro de la Afrika Komisiono de UEA kaj laste ĝia kunordiganto. Li kalkulos je la helpo de tri vicreĝisoroj:

- Espoir Kasati, instruisto kaj poligloto el Kongo DR, por la subtemo 'Lingvo';
- Miora Raveloharison, instruisto kaj aktivulo pri virina agado el Madagaskaro, por la subtemo 'Homo'
- Cyprien Guiya, agronomo el Benino, por la subtemo 'Medio'.

Por kontakti la reĝisoron pri la kongresa temo, skribu al la diskutlisto kongresatemo@groups.io. Ĉiuj estas invitataj aliĝi al la 109-a UK per la reta aliĝilo: https://uk.esperanto.net/2024 antaŭ la fino de la dua aliĝperiodo en **la 31-a de marto.** Donace subteni la 109-an UK-on, eblas per la Fondaĵo Afriko: https://uea.org/alighoj/donacoj/afriko.

Fonto: Koncizigita el Gazetara Komuniko de UEA

## Pensoj pro la Tago de UN en 2023

Dum la *Tago de Unuiĝintaj Nacio*j festas la datrevenon de la ekvalido, la 24-an de oktobro 1945, de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj (UN). Per la ratifo de ĉi tiu dokumento, la plej granda parto de ĝiaj subskribantoj, inkluzive la kvin konstantajn membrojn de la Sekureca Konsilio, la Ĉarto oficiale ekvalidis.

Rafaela Urueña, Emerita Profesoro pri Internacia Juro kaj Internaciaj Rilatoj, Universitato de Valladolid, Hispanio

## Italio kaj ĉinio ligita per Esperanta agado

Parma festas teon, amon kaj la mondon.

Jen ponto esperanta inter Italio kaj Ĉinio.

https://esperanto.cri.cn/2024/02/02/ARTIryZlx5obWRagXsjlwyS5240131.shtml

https://esperanto.cri.cn/2024/02/07/ARTI4zLjCCVXT3e60hZtoijc240207.shtml

Alessandra Madella

## ILEI invitas vin al ilia kongreso en Maceio, Brazilo

Aliĝilo jam estas: ĉe: 2024.kongreso.org

Ĝuu la filmeton kiu prezentas la ejon kaj la kongreson. Jen la ligilo:

https://youtu.be/tdMIUySeqHI?si=DjMOazu35Kz8MQb8

Laura Brazzabeni, Estrarano en ILEI pri kongresoj

## Blinduloj kaj balkananoj kune?

La 88-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazos en Beogrado, la ĉefurbo de Serbio, inter la 17-a kaj la 24-a de aŭgusto 2024, kun la ĉeftemo: "Planlingvoj kiel ponto inter diversaj kulturoj kun speciala rolo de Esperanto tiucele"

Jen interesa demando: Ĉu io komuna de balkananoj planeblas por tiu evento? Ĉu io komuna de balkananoj planeblas, krom ĉi tiuj kunvenoj? Ĝis nun la nove fondita balkana/danuba grupo kunvenis nur rete, sed jen eblo por la grupo fizike kunveni.

Radojica Petroviĉ

## Barato multon scias pri gepatraj lingvoj

Jen blogaĵo pri la agado de esperantistoj en Barato dum la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo (ITGL). Ni rikoltis tradukaĵojn en 11 barataj lingvoj... plus en la rusa! Legu pli en:

https://lingvovivo.blogspot.com/2024/02/tago-de-la-gepatra-lingvo-barataj.html

Giridhar RAO, Barato

# Salubraj Saltjaraj salutoj!

========= vortoj: 1150 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

**Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj**

**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj**

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>.